

Eldonantaro:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norfa, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucuresti
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, komercisto, Antwerpen (Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifon

por abono kaj reklamo vidu sur lasta paĝo

Administrela:

(sufiĉa adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bei Köln, Germani.

Redaktistaro:

Cefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktistoj: M. Butin.
Literatura red.: Zanol.

Kunlaborantoj

inter la Esperantistaro de la tutmondo.
Manuskriptojn oni akribu nur sur unu flanko de la papero.

Tarifon

por abono kaj reklamo vidu sur lasta paĝo.

Oficiale Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.

Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komercio“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Antwerpen-Anvers, Barcelona, Bucuresti, Edinburgh, Horrem b. Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

Internacia Konferenco por Komuna Komerca Lingvo.

Venezia, 2.-4. Aprilo 1923.

Antaŭ la paĝo malfermita.

Jen! La paĝo, kiun ni — tute vintron — kva-
zaŭ tremante atendis foliumi, estas malfermita
antaŭ niaj okuloj.

Ni tralegis ĝin dum tiuj ĉi tagoj. La hela
suno de Italio brilas sur ĝi. Bone do ni povas
ĝin tute nun vidi, per unu rigardo en ĝia plen-
eco ĝin konsideri.

Ni Italioj feras, ĉar sur ĝia titolflanko estas la
nomo Venezia. Sed ni ĉiuj, samideanoj ĉiunacelaj
bone povas fieri pri ĝi.

Praktika idealismo! — mi ne scias, kiu
jetis tiun ĉi krion. Sed ĝi estas ĉiam pli ĝusta.
Ia, se la „Internacia ideo“ ne estas celo, nepre
fatala konsekvenco ĝi estos de la sukceso.
Neniu do havu ĉi tiun timon, ke Esperantismo per-
digu, kiam Esperantistoj kunvenas por preparoli
ekonomiajn, eĉ materialajn aferojn de la tutmondo.

Grava sukceso estas la Venezia Konferenco.
Per ciferoj kaj priskriboj certaj ĝi pruvas unufoje
ankoraŭ la taŭgecon de Esperanto por ĝiaj celoj
de interkompreniĝo, spertitan inter kaj ekster
samideanoj, — per ciferoj kaj deklaroj certaj ĝi
pruvas la disvastiĝadon konstantan, eĉ ne mal-
rapidan, de la kompreniĝo pri la valoro kaj
signifo de Esperanto en la oficialaj kaj plej povaj
rondoj de Homarulo.

Sen iluzioj! — Ja bone ni scias, ke ni
jetis tiel nur la unuan grimpsuparon al la fortik-
o. *Pasintjare* ni ekatakis la tutmondan Lernejon,
ĵus ni ekatakis la tutmondan Ekonomion. La
batalo, kiu enirigos nin en ambaŭ fortikaĵojn,
komenciĝis.

En ambaŭ okazoj registaroj kaj fakestraroj
ĉeestis kiel observantoj. Registaroj kaj fakestraroj
iam, morgaŭ aŭ alian tagon ne gravos, ili mem
devos gvidi ĉi tiujn antaŭenpaŝantojn manifestojn.

Al bonvolaj homoj ni montras la vojon. La
ĵusa kunsidaro estas alia fajro, kiu brulas sur
monta pinto, por ke la homaro ekgrimpu el la
mallumaj valoj al certa celo.

Ja de Bacon kaj Galilei spertisto estas profeto,
kiu alparolas la vorton de l' estonto.

Ni ne vantu, ni ne senkuraĝigu timante, ke la
vorto de ni dirita utilos eble nur al aliaj, eĉ mal-
bonigos al ni. Tia vorton disporti tra la mondo,
estas nia evidenta nepra devo. Evidenta nepra
devo, kiu maturiĝis por ni en la malhelaj intern-
aĵoj de l' historio. Devo antaŭ Dio kaj antaŭ la
Homaro.

Hano kaj lia filo.

De Maksim Gorĵki.

„Estis en Krimeo hano Mosalaĵma el-Asvab,
kaj li havis filon Tolajk Algalla...“

Sin apoginte per la dorso al helbruna trunko
de arbutus¹⁾, blinda almozulo, tataro, komencis
per tiuj ĉi vortoj unu el la malnovaj legendoj de
l' duoninsulo, riĉa je rememoroj, kaj ĉirkaŭ la
rakontanto, sur ŝtonoj — romprestajloj de ruin-
iĝinta pro malnoveco hana palaco — sidis grupo
de tataroj en helkoloraj ĥalatoj kaj ore broditaj
ĵubetelkoj²⁾.

Vesperigis, kaj la suno estis frankvile mallevi-
ganta en la maron; ĝiaj ruĝaj radioj traigis mal-
lumajn verdajamasojn ĉirkaŭ ruinoj kaj helmakule
kuŝiĝis sur ŝtonoj muskovritaj kaj kaŝitaj en
alkroĉigema hedero.

Vento bruis en aro de maljunaj platanoj, kaj
iliaj folioj tiel murmuris, kvazaŭ en la aero fluetus
nevideblaj por la okuloj akvoriveretoj.

La voĉo de l' blinda almozulo estis malforta
kaj tremis, lia ŝtona vizaĝo per siaj sulkoj nenion
esprimis krom trankvilo; parkere sciataj vortoj
verŝiĝis unu post alia, kaj antaŭ la aŭskultanto
leviĝis bildo de la pasintaj tagoj, riĉaj je senforto.

„Hano estis maljuna,“ rakontis la blindulo,
„sed en lia haremo estis multaj virinoj. Kaj ili
amis la maljunulon, ĉar en li estis ankoraŭ sufiĉe
da forto kaj flamo, kaj liaj karesoj dolĉigis kaj
bruligis, ĉar la virinoj ĉiam amos tiun, kiu povas
forte karesi, eĉ se li estus griza kaj multesulka
lia vizaĝo — en forto estas beleco, tute ne en
delikata haŭto kaj vangruĝo.“

Ni ne elektis ĝin. Nin elektis la kaŝita Volo
plejsupera, kiun ni aŭdis ree, kiel sub la silueto
de Hradčany kaj ĉe Lemano lazura, nun tie ĉi sub
la pura ĉielo, antaŭ la senlima maro, sub la mal-
rapide disiranta ondado de l' sonoraj de San-
Marka turo.

Ni levas la manojn al Dio, kaj poste ni klin-
iĝas pli forte por ligi niajn piedŝnurojn, repreni
la vojaĝakon sur la ŝultron kaj ree antaŭenpaŝi.

Ĉar jena estas la kerna devo de l' vivo: paŝi
antaŭen!

Umberto Toschi.

La Konferenco.

Paskolundon, je la 10-a horo la Konferenco
estis malfermita en la Kunsida Salono de la
Komerca Ĉambro de Venezia. Granda aro da
ĉeestantoj plenigis la seĝaron. La listo de la
oficiala delegitaro enhavas la nomojn de 188
personoj el 21 landoj. Entute ĉeestis ĉirkaŭ 200
personoj.

Prezidis la konferencon Kavaliro Umberto
Scattola de la Komerca Ĉambro de Venezia, kiu
solene bonvenigis la konferencon. Kiel oficiala
komisiito de la sama Ĉambro poste parolis s-o
Kavaliro Pianetti, deklarante, ke la Venezia
Ĉambro estas feliĉa povi unuigi tiun universalan
delegitaron, celantan priirakti tiom aktualan
kaj problemon tiom gravan por la tutmondaj
industrio kaj komercio. En la nomo de la komun-
umo kaj la oficialaj rondoj de Venezia Kavaliro
Ponti, asesoro en la urbestro, salutis la kon-
ferencon kaj aligis al la opinio, ke la urbo de
Venezia estas flera protekti tiun specialan kaj
gravan konferencon. Sekvis lin D-ro Chiostergi,
ĝenerala sekretario de la Itala Komerca Ĉambro
en Svislando. En elokventa kaj entuziasma
parolado li akcentis la seriozan karakteron de la
konferenco kaj klarigis la kialojn, kiuj instigis la
nomitan ĉambron kunvoki tiun konferencon. Jam
antaŭe li estus konvinkita, ke ĝi havos sukceson
kaj ekkaptos interesatojn ĝis nun indiferentajn.
La itallingve farita parolado estis tradukita Esper-
anten de D-ro Rina, ankad oficiala reprezentanto
de la Itala Komerca Ĉambro por Svislando.

Poste okazis la elekto de la prezidantaro.
Kiel honoraj anoj de la prezidantaro estis elekt-
ataj: la Komerca Ĉambro de Venezia, kaj la
ĉambroj de London kaj Paris. Kiel prezidanton
de la konferenco oni elektis s-on John Merchant,
prez. de la Komerca Ĉambro de Sheffield, kaj
kiel vicprezidantojn s-on Prof. Komandanton

Ĉiuj amis hanojn, sed li amis unu kazakinon
militkapitan el apudnjepraj³⁾ stepoj kaj ĉiam
karegis sin pli volonte ol la aliajn virinojn de l'
haremo, de sia granda haremo, kie estis tricent
virinoj el diversaj landoj, kaj ĉiuj ili estis belaj
kiel printempaj floroj, kaj ilia vivo estis bona.
Multe da bongustaj kaj dolĉaj manĝaĵoj estis pre-
tigataj por ili laŭ ordono de l' hano, kaj ĉiujfoje
li permesis danci kaj ludi, kiam ili tion deziris.

Kaj sian kazakinon li ofte vokis al si en la
turon, el kiu la maro estis videbla kaj kie li
havis por la kazakino ĉion, kio estas necesa al
virino, por ke ŝi povu gaje vivi: dolĉan nutraĵon
kaj diversajn ŝtofojn, kaj oron, kaj ŝtonojn ĉiu-
kolorajn, kaj muzikon, kaj malofte troveblajn
birdojn el malproksimaj landoj, kaj fajrajn karesojn
de l' enamiĝinta hano. En tiu ĉi turo li amuziĝis
kun ŝi tujajn tagojn, ripozante post la penadoj
de sia vivo kaj sciant, ke lia filo Algalla ne
perdos la gloron de l' hanregno, vagante kiel
lupo tra la rusa steparo kaj ĉiam revenante de
tie kun riĉa akiraĵo, kun novaj virinoj, kun nova
gloro, lasante tie, post si, teruron kaj cindron,
kadavrojn kaj sangon.

Foje Algalla revenis de invado al la rusoj,
kaj multaj triumfestoj estis aranĝataj je lia gloro,
ĉiuj „murza'oĵ“⁴⁾ de l' Krimeo kunvenis, ludoj kaj
festeno okazis, kaj oni pafis el pafarkoj en la
okulojn de l' kapitoj, provante brakforton, kaj
denove drinkis, gloriante la kuraĝon de Algalla,
fulmotondron por la malamiko, apogon por la
hanregno. Ho! la maljuna hano tiom ĝojis pri
la gloro de l' filo. Bone estis por la maljunulo
vidi en sia filo tiun bravulon kaj scii, ke, kiam
li, la maljunulo, mortos, la hanregno estos en
fortaj manoj.

Ravizza de la Komerca Ĉambro de Milano kaj
s-on Baudet, prez. de la administra konsilantaro
de komerca instruado en Paris kaj del. de la
Komerca Ĉambro de Paris. La sekretariejon
prenis sur sin la Itala Komerca Ĉambro en
Svislando.

Sekvis la salutaroladoj de la oficiala re-
prezentantaro: Kavaliro Vaona de Verona por la
konferenca komisiono. Prof. Baudet por la
Komerca Ĉambro de Paris, s-o Pitlik, delegito de
la Industria kaj komerca ministerio de Ĉeĥoslovakio,
s-o Edmonds de la Komerca Ĉambro de Londono,
D-ro Dietterle, delegito de la germana ministerio
por internaj aferoj, s-o Klajić de la financa minist-
erio de Jugoslavio, komand. grandindustriisto Fišer
el Bucuresti por la rumana registaro, s-o Kenn
de la Komerca Ĉambro de Peking, s-o Tarelli de
la Internacia Laboroficejo en la Ligo de Nacioj,
s-o Pujula de la Komerca Ĉambro de Barcelona,
s-o Schade de Wien. Ĉiuj oratoroj preskaŭ unuanime
aldonis al la salutvortoj la konvinkan opinionon, ke
Esperanto estas taŭga helpilo por la internaciaj
industrio kaj komercio kaj sendube povos grave
akceli la pilbonigon kaj plifaciligon de la inter-
naciaj komunikoj. Post kelkaj detaloj pri la pro-
gramo de la konferenco s-o D-ro Privat elo-
kvente dankis al la organiza komitato kaj la
protektantoj, esprimante la deziron, ke la laboroj
de la konferenco estu fruktedonaj. Tiel la solena
malferma kunsido estis fermata.

Je la 15-a horo komenciĝis la laboroj de la
konferenco mem. Ĉar laŭ la tagordo devis raportil
unue la reprezentantoj de la diversaj foiroj, s-o
Merchant provizore transdonis la prezidantecon
al s-o D-ro Dietterle, prezidanto de la Interfoira
Komisiono. Post enkondukaj vortoj pri la pionira
laboro por-Esperanta de la foiroj uzantaj Esper-
anton, la parolo estis donata al la reprezentanto de
la internacia foiro de Frankfurt a. M., kiu kiel la
unua internacia foiro uzis Esperanton por reklam-
celoj en plej vasta amplekso. En preskaŭ unu-
hora parolado s-o Kreuz submetis al la konferenco
interesege materialon pri la uzo de Esperanto en
la foiro de Frankfurt a. M. Montriĝis evidente, ke
Esperanto estas valorega helpilo al la foiroj.
Detalojn enhavas la oficiala raporto, baldaŭ aper-
onta. Sekvis al tiu parolado la raportoj de la
aliaj foiroj jam aplikintaj Esperanton. Surprizite
oni povis konstati, ke 20 foiroj tuj uzas Esper-
anton. Parolis oficiale por Barcelona s-o Pujula,
por Bordeaux (neoficiale) s-o Marly, por Breslau
s-o Freund, por Budapeŝt s-o Balkányi, Helsing-
fors kaj Malmoe estis reprezentataj per anstataŭ-

antoj, Lyon (neoficiale) s-o Poncet, Milano s-o
Mainardi, Padova s-o Saggiori, Paris (neoficiale)
s-o Rousseau, Praha s-o Pitlik, Reichenberg s-o
Scholze, Valencia anstataŭanto, Wien s-o Schade,
Zagreb kaj Ljubljana s-o Dutković. La aliaj
foiroj estis sendintaj leterajn respondojn. En
interesa resumo s-o D-ro Dietterle, raportante pri
Leipziga foiro, montris la valoron de la foira
reklamo per-Esperanta por Esperanto mem. Je la
fino li ankoraŭ faris interesajn scigojn pri la ĝis-
nunaj laboroj de la Interfoira Komisiono, fondita
okaze de la XIII-a Universala Kongreso de Esper-
anto en Praha. Nome de la foiro de Padova s-o
Saggiori invitis la oficialajn reprezentantojn de
foiroj ĉeesti al bankedo aranĝota de la itala foiro
en Padova. La ĉefa rezulto el la raportoj de
la foir-representantoj estas la jena rezolucio:

La reprezentantoj de la foiroj de Barcelona,
Bordeaux, Breslau, Budapest, Frankfurt a. M.,
Helsinki, Leipzig, Ljubljana, Lyon, Malmoe,
Milano, Padova, Paris, Praha, Reichenberg, Va-
lencia, Wien kaj Zagreb, kunvenintaj en Venezia
dum la Internacia Konferenco por Komuna Ko-
merca lingvo, interŝanĝis dum tri kunsidoj siajn
spertojn rilate la praktikan uzon de Esperanto, ĉu
per sia internacia reklamo, ĉu per sia korespond-
ado, ĉu per siaj propraj rilatoj kaj konferencoj, kaj
unuanime konstatas, ke Esperanto estas la plej
taŭga, simpla, ekonomia rimedo por internacia
komunikado kaj rekomendas, ke oni, post sukces-
plenaj eksperimentoj, ĝeneraligu ĝian uzadon.

Kun granda aplaŭdo la kunsido estis fermata.

Je la 18-a horo malfermiĝis la pordoj de
la Palaco Napoleono en kies ora salono
Kavaliro Ponti bonvenigis la konferencanojn en
la nomo de la urbestro. Rilatante al la lingvaj
malfacilaĵoj en la internacia interkompreniĝo, li
aludis je la fakto, ke Esperanto unuigas la orien-
ton kaj la okcidenton, la proksimajn kaj malprok-
simajn landojn, unuvorte, ke ĝi estas laŭ lia im-
preso de la konferenco la sole taŭga ilo por la
progresigo de la humaneco. Post respondo de
s-o Merchant sekvis gvidado tra la palaco kaj
afabla regalo laŭ invito de la urbestro. Por
honori la gastojn, speciala koncerto de la urba
orkestro okazis samtempe antaŭ la Palaco sur la
Placo de San Marco.

La proksima konferenco okazis en Hotelo
Wagner sur Insulo Lido, kie loĝis la plejparto
de la konferencanoj. Sub la prezido de s-o
Merchant, s-o Tarelli, oficiala reprezentanto de
la Internacia Laboroficejo en la Ligo de Nacioj,

Bone estis por li konsil tiun, kaj — dezir-
ante montri al sia filo la forton de sia amo — en
ĉeesto de ĉiuj murza'oĵ kaj bekoj⁵⁾, dum festeno,
kun pokalo en la mano, li diris al Algalla: „Bona
filo ĉi estas, Algalla! Gloron al Allah, kaj estu
glorata la nomo de Lia profeto!“

Kaj ĉiuj gloris la nomon de l' profeto per ĥoro
de l' voĉoj potencaj. Poste la hano diris: „Grandega
Allah! Ankoraŭ dum mia vivo vi revivigis mian
junecon per mia kuraĝa filo, kaj jen mi vidas per
maljunaj okuloj ke, kiam malaperos por ili la
suno kaj kiam venos tra fosos mian koron, mi
estos vivanta per mia filo! Grandega Allah estas
Allah kaj Mahomet, Lia vera profeto! Bonan filon
mi havas, forta estas lia mano, kaj sentima la
koro, kaj klara la menso... Kion vi deziras
preni el la manoj de cia patro, Algalla? Diru,
kaj mi donos al ci ĉion laŭ cia deziro.“

Kaj ne forliĝis ankoraŭ la voĉo de l' hano-
maljunulo, kiam sin levis Tolajk Algalla kaj, ek-
briliginte la okulojn nigrajn kvazaŭ maro nokte
kaj brulantajn kvazaŭ la okuloj de l' monta aglo,
diris: „Donu al mi vian rusan kaptilinon, ordon-
ulo-patro.“

Silentis la hano — iom silentis, nur tiom da
tempo, kiam estis necese por ekregi kortremojn
— kaj, poste, firme kaj laŭte li diris: „Prenu!
Kiam la festeno estos finita, ci prenos sin.“

Ekflamis la brava Algalla, grandega ĝojo ek-
brilis en liaj aglaj okuloj, li levigis je tuta kresko
kaj diris al sia patro-hano: „Mi scias, kion vi
donacas al mi, ordonulo-patro! Tion mi scias.
Mi estas via sklavulo — via filo. Prenu mian
sangon po unu guto ĉiuhore — dudek fojojn mi
mortus por vi!“

⁵⁾ bek = nobelo.

¹⁾ Ĉiamverda arbo.

²⁾ „Ĵubetejka“ = tataro kapvescio.

³⁾ Dniepr = rivero.

⁴⁾ murza = tataro princo.

raportis pri la rezulto de la uzo de Esperanto por celoj propagandaj de la oficejo. Ke la prove estis kontentiga, montras la fakto, ke de kelka tempo la oficejo aperigas specialan bultenon en Esperanto. Al tiu tre interesa parolado aliĝis parolado de s-o *Baudet* de la Komerca Ĉambro de Paris. Li raportis pri la laboroj de speciala komisiono starigita de la Parisa Komerca Ĉambro kaj per impresaj argumentoj pledis por la akcepto de la rezolucio proponita de la nomita ĉambro. Esperanto devas esti komparata al telefono kaj radiotelegrafio kaj kvazaŭ mekanismo de interkompreniĝo disvastigata per ĝia uzo. Ĝia gramatiko facila kaj sen esceptoj faciligas tiun ĉi laboron.

Delegitoj de pluraj nacioj nun raportis pri la uzo de Esperanto en komerco kaj industrio kaj pri ĝia instruo en komercaj lernejoj. Unuavice menciindaj estas la detaloj donitaj de s-o *Edmonds* de la Komerca Ĉambro de London, de Grafo *Rinaldi* por Italujo, de s-o *Agourline* por la francaj komercaj ĉambroj kaj la grava fakjurnalo „Le Cuir“ en Paris. Devas ankoraŭ esti citataj la raportoj kaj alparoloj de s-oj *Hromada* kaj *Sklenčka* el Ĉeĥoslovakio, de s-o *Scholze* por germana Bohemio, D-ro *Vogt*, delegito de la germana ministerio de ekonomio kaj de aliaj personoj. La sekretariejo ricevis abundan materialon publikigotan por diskonigo. El la diskuto rezultigis, ke de preskaŭ 80 komercaj ĉambroj reprezentitaj kvindekfo jam aprobis Esperanton, ĉu per rezolucio simila al tiu proponita nun de Paris, ĉu per subvencioj, ĉu per aliaj helpoj.

La kunsido estis daŭrigata posttagmeze. Aro da reprezentantoj de korporacioj kaj entreprenoj konstatas la jaman uzon de Esperanto. Speciale atentindaj estis la paroloj de s-o *Blaise* de Belga Komerca Ĉambro, de s-o *de Benedetto*, de s-o advok. *Vaona* kiel raportanto por la Itala Komerca Ĉambro en Montevideo en Urugvajo, kaj de s-o *Pedrazzini* por la hispana Ameriko. Kiel ĉefa deziro de la konferenco devas esti atentata la peto zorgi, ke la konstatitaj faktoj estu diskonigitaj al kiom eble plej multaj rondoĵ komercaj. Tiacele la konferenco aŭdis kun intereso, kiamaniere funkcias la servoj de la Universala Esperanto Asocio. S-o *Blaise* submetis detalan programon pri surkonstruo de la servoj, garantiintaj la plian enpenetron de Esperanto en la praktikan vivon. Aliaj praktikaj proponoj aliĝis al tiu, inter alie estis proponata la kreo de Internacia Informservo Komerca. Pro troa ŝarĝo de la programo la baloto pri la Rezolucio de la Parisa Komerca Ĉambro estis prokrastata ĝis la proksima tago.

La 5-an de aprilo, matene je la 10-a horo daŭrigiĝis la diskutoj. Pri la tagordo „Esperanto kaj la Turismo“ raportis s-o *Pitlik*, reprezentanto de la direkcio de turismo en la komerca ministerio ĉeĥoslovaka, poste parolis s-oj *Agourline* por Francujo, *Dragomir* por Ĉeĥoslovakio, D-ro *Toschi* por Italujo, s-ino *Tissot* por Svislando kaj s-o *Fišer* por Rumanio. El la vico de raportantoj speciale menciinda estas s-o *Poncet* el Lyon, kiu donis atentindan materialon pri la uzebleco de Esperanto por turistaj karavanoj. Konstatite estas, ke aperis grandega aro da gvidlibroj en Esperanto, ebligante vere universalan aplikon de la helplingvo en la praktiko. Koncerne turismon estis farataj jenaj rezolucioj:

Propono de l' Sindikato deDauphiné(*Agourline*-Paris):

La Internacia Konferenco por Komuna Komerca Lingvo — laŭ propono de la turisma sindikato de Daŭphiné — konsiderante la sukcesajn spertojn jam faritajn kaj la grandan nombron de gvidlibroj en Esperanto, proponas al turismaj asocioj, agentejoj kaj eldonejoj, eldoni gvidlibrojn en Esperanto aŭ almenaŭ dediĉi kelkajn paĝojn al Esperanta resumo de

ilĵaj gvidlibroj, ĉar tio estas la plej ŝpariga rimedo por konigi la belaĵojn de iu ajn urbo aŭ regiono en ĉiuj landoj.

Propono *Pedrazzini*-Meksiko:

La Internacia Konferenco por Komuna Komerca Helplingvo invitas la hotelstajn societojn enkonduki la instruadon deEsperanto en siajn lernejojn kaj instrui Esperanton al sia servistaro.

Du suplementoj laŭ proponoj de s-oj *Fišer*-Rumanio kaj *Jakob*-Genève rilatas al la teknika plibonigo de la aranĝo proponata. Same detala proponaro al Universala Esperanto Asocio kaj speciala klarigo de s-o *Baudet*-Paris. Ambaŭ rezolucioj estis unuanime akceptataj.

Parto de la diskutoj estis dediĉata al la rilatoj de Esperanto al la senfadenaj telegrafio kaj telefonio. Detalan referaton pri tio faris s-o *Saggiori*, komisiite de la Radio-Club d'Italia. Ĝia enhavo rezultigis el rezolucio, proponita kaj unuanime akklamita de la konferenco. S-o *Fišer*-Rumanio atentigis ankoraŭ speciale je la utllo, kiun Esperanto povus havi por la fonokinematografio. Jen la teksto de la rezolucio:

La Konferenco por Komuna Komerca Lingvo, en kiu partoprenas ankaŭ reprezentantoj de kelkaj radio-ekstraj societoj, konstatas, ke la tutmonda disvastiĝo de senfadena telefonio, nepre postulas rimedon por superi la lingvajn barilojn kaj rekomendas la uzon deEsperanto por komunikaĵoj destinitaj al eksterlanda aŭdantaro.

Posttagmeze okazis la solena ferma kunsido de la konferenco. En ĝi okazis la akcepto de la Rezolucio de la Komerca Ĉambro de Paris laŭ la propono de s-o *Guerrit*:

Konsiderante, ke la tutmondaj interŝanĝoj estus faciligitaj per uzado de internacia helpa lingvo,

konsiderante, ke tio tute ne devas malutili al la naciaj lingvoj, intime ligataj al historio de ĉiu lando kaj riĉaj je senmortaj ĉefverkoj,

konsiderante, ke kontraŭe la helpa lingvo devas esti kvazaŭ kodo kaj interpretilaro inter la nacioj, kaj ke tial estas necese povi akiri ĝin per facila kaj rapida lernado,

konsiderante, ke la lingvo Esperanto posedas ĉiujn dezirindajn kvalitojn de klareco kaj metoda simpleco, laŭ la vidpunkto de la pronuncado kaj ankaŭ de la gramatiko, de l' vortaro kaj de la riĉeco je esprimmanieroj,

konsiderante, ke grandaj spertoj komercaj estas faritaj de diversaj landoj, la Internacia Konferenco en Venezia voĉdonas la deziresprimojn:

1-e ke la instruo de Esperanto estu enkondukata en ĉiujn komercajn kaj industriajn lernejojn de ĉiuj landoj,

2-e ke la Komercaj Ĉambroj, ekonomiaj grupoj kaj turismaj oficejoj, kiuj deziras faciligi la komercajn interŝanĝojn kaj internaciajn vojaĝojn, helpu al la rapida disvastigado de la internacia lingvo,

3-e ke la Komercaj Ĉambroj, kiuj ankoraŭ ne estas konvinkitaj pri la oportuneco de la unua kaj dua deziresprimoj, faru provojn similajn al tiu, farita de la Komerca Ĉambro de Paris.

Poste oni akceptis la jam cititan rezolucion de la Internaciaj foiroj. D-ro *Dietterle*, kiel prezidanto de la Interfoira Komisiono, ĝin proponis kaj laŭlegis. Sekvis al ĝi la aprobo de la rezolucio pri apliko de Esperanto al radiotelefonio. Du aliaj dezir esprimoj: la unua laŭ propono de s-o *Delanoue*, nome de la Ĝenerala Unuiĝo de Tekn kaj Lernantoj en Franclando sin turnas al la Internacia Telegrafita Oficejo, petante aprobi Esperanton kiel vivantan lingvon; la dua al la Intelekta Komisiono en la Ligo de Nacioj, devanta studi la demandon de internacia helplingvo, konforme al la decido de la Ligo, ke ĝi, ekzamenante kaj kontrolante

la materialon de la konferenco, proponu la ĝeneraligon de la uzo kaj instruo de Esperanto (Propono *Fišer*-Bucureŝti).

Post kuraĝigaj vortoj de la prezidanto s-o *Merchant* kaj dankesprimoj al la aŭtoritatoj de Venezia kaj la kunvokintoj de la konferenco, la prezidanto cedis la parolon al D-ro *Chiostergi*, ĝenerala sekretario de la Itala Komerca Ĉambro por Svislando. Tiu dankis al la prezidanto por la gvidado de la konferenco kaj en eleganta kaj entuziasma ferma parolado finis la diskutojn.

Vespere okazis en **Hotelo Wagner** brila bankedo oferita de la Organiza Komitato; ĝi daŭris ĝis noktomezo. Aro da oratoroj festis la sukcesojn de la konferenco per vivaj tostoĵ kaj impresaj bondeziroj.

Flanke de la konferenco okazis kunveno de UEA-komitataĵoj kaj delegitoj, kunsido de la Interfoira Komisiono kaj priparolo de Esperantaj komercistoj, kiuj krels Internacian Borson de Komercaĵoj. Ĝi funkciis jam dum la konferenco kaj atingis interesindan sukceson. Entute la konferenco estas unika sukceso. Kvankam la rezulto multfoje superis la esperojn de seriozaj pretendoj, la devo de niaj samideanoj restas, daŭrigi la pioniran agadon por la disvastigo kaj fina venko de Esperanto.

Ĉeestinto.

Esperantaj Interperaj Agenteloj.

La demando pri utilligo de Esperanto kaj de la Esperantistaro por la internaciaj negoco-rilatoj estas unu el la plej gravaj en nia celado enkonduki helplingvon en ĉiujn sferojn de interpopola vivo.

Tiun ĉi aktualan demandon tuŝis D-ro Leono *Zamenhof* en ET n-o 122, publikigante projekton pri internacia organizado de „Interperaj Agenteloj“, kies tasko estos servi al la vasta publiko per interperoj en ĉiaj aferoj komercaj, sciencaj, profesiaj k. s. Laŭ la ideo de l' projektinto, la „Agenteloj“ devas esti entreprenoj apogitaj sur komercaj principoj (kiujn povas financi ankaŭ ne-Esperantistoj), uzantaj en ĉiu adresata al ili informopeto la konon de fakuloj plenumantaj siajn servojn ĝuste kaj rapide.

S-o *Selmer*, kiu en n-o 128 priparolas tiun ĉi projekton, tute ne kontraŭbatalas la principan necesecon de tiaj organizaĵoj. Kontraŭe, lia komercista sperto, pri kiu li tie rakontas, pruvas, ke la nun ekzistantaj en tiu ĉi sfero rilatoj devas esti konsiderataj kiel tute nekontentigaj kaj, ke la malvigleco de niaj samideanoj eĉ rekte malutilas al nia movado. Do, des pli stranga aperas la konkludo de s-o Selmer, ke ni plue sekvu la ĝisnunan vojon, uzante la servojn de h a z a r d e trovitaj samideanoj, delegitoj de UEA aŭ laj Esperanto-entreprenoj, kiujn li, fine, proponas devigi al respondado kaj klopodado pri alvenintaj al ili petoj. S-o Selmer, tamen ne malkaŝas al ni la misteran forton, per kiu li esperas devigi ilin al tio.

Ĉu tia, ĝenerale, povas ekzisti?

S-o Selmer timas „amason de novaj Esperanto-institutoj sen praktika valoro“. En tiu ĉi punkto li malĝuste komprenis la ideon de la „Interperaj Agenteloj“, kiu celas krei komence nur kelkajn seriozajn, gvidatajn de personoj kompetentaj, entreprenojn, kies speciala tasko estos ĉiuspeca interperado (ne agentado pri iu speciala komercaĵo). Tri-kvar da tiaj interligitaj „Interperejoj“, lokitaj en la plej gravaj internaciaj punktoj, fondas jam sufiĉan bazon por elpaŝi publike kaj proponi siajn servojn al la ĉiulanda komercistaro kaj al aliaj personoj, bezonantaj interperojn kun alilandanoj. Sekve, tio devas esti privataj komercaj entreprenoj uzantaj Esperanton kiel la plej oportunan ilon por siaj celoj.

La funkciigo de tiaj agentejoj, kiu grandamplekse aplikos Esperanton por la vasta publiko, estos sendube grava okazo por montri al la mondo la valoron de Esperanto kiel efektiva internacia komunikilo.

Sur tiu ĉi vojo Esperanto gajnos ne nur teorie, sed praktike.

Ĉiu vigla kaj kompetenta samideano, kiu sentas la aktualan mankon de tiaj entreprenoj kaj konscias ilian gravecon por la ĝenerala bono de nia komuna afero, nepre kunhelpos por ilia starigo.

Ch. Bronsztein, Warszawa.

Flugfolieto.

Hodiaŭ mi estis en la marĉo. Kvakadis la ranoj. Ili kvakadis konstante, senrespekte kaj sintrude. Kion do — mi pensis — ili kvakadas? Prudenta randelegito klarigis al mi, ke ili voĉdonadas. — Jen kion! Kompreneble! Mi ja aŭdas, ke ili donas sian voĉon laŭ la plej vasta senco de l' vorto. — Ne grave estis por mi ekscii pri kio ili voĉdonis. Sufiĉas ja voĉdoni pri iu ajn afero, por gajni teron kaj ĉielon, ekzemple: pri impostoj pagotaj al la loka, provinca, landa, unversala ranasocioj kaj al diversaj oficialaj rano-institutoj, pri partopreno en ĉiuj kongresoj de la nomitaj societoj, pri la interna ideo de l' vera (sencikonia) raneco, t. e. la fielnomata ranismo, pri la grava problemo, ĉu la patromarĉo de la ranoj nomiĝas Ranujo, Ranio aŭ Ranlando ktp.

